GISTO, MAR,2010
STR. ESPERANTO, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Donace por V-Kafo-ĉeestantoj.
Krom foraj loĝantoj, R$ 1,00

.....

NAISMO

Nia diligenta Zaghetto enmanigis al mi okpaĝan tekstaron pri NAismo, far lingvistoj, kun pluraj opinioj de prilingvaj kritikistoj. Konfesendas ke mia scio ne rajtas aldoni ankaŭ mian validan opinion. Mia supraĵa tralegado igas min manifesti mian aprecon por ĝi en certaj kazoj, ekz .kiam oni volas/devas citi kurtigon kiel subjekton de la frazo: “ĉiu entuziasma esperantisto devas forte subteni na UEA”...ĉiu VerdaKafano estimas na Solon; aŭ, kontraŭ fundamenta fanatikismo oni donu na Putin.(Ĉu Putin-n?) Kun la regulara N-finaĵo la vorto fariĝas la universala difino por ĉiesulinoj. (eksprezidento de Rusio). Krome, homo unuafoje vidante E-tekston tuj abomenas la kripligon de bone konataj vortoj/nomoj. Ekz.Dejsono-n =(Dayson) kaj ceteraj... - Dum niaj babiladoj Karesema manifestis sian preferon: ne enkonduki ŝanĝojn en la gramatikon...ke NA estas nenecesa, ke oni klare komprenas la frazon sen la akuzativo - . Kaj vi, karaj gelegantoj, kion vi diras? Ĉu vi volas tralegi la tekstojn? Zagheto certe bonvolos pruntedoni ĝin al interesatoj.

Kuriko’jen vorto tute kripla, se oni devas/volas aldoni la akuzativan-N post adopti la necesajn literojn por ke ĝin oni prononcu plej proksime de ĝia originala nomo. – Ĝi ĝus alvenis per mesaĝo de nia diligenta radioamatoro, samideano Hektor Gres, el tiu ĉilia urbo kiu situas tuj apude de la epicentro kiu kaŭzis la tre teruajn detruojn far la tertremo tie okazintaj, je 8,8 gradoj laŭ la Riĥter-skalo. Hektor kaj lia olda panjo sane postvivas sed timigitaj. Ĵus li informis ke lastan semajnon tri grandaj tremegoj okazis. La lasta, ĵaŭde, atingis preskaŭ saman intensecon de la ĉefa tertremo, pasintan semajnon. Hektor tre suferas pro la fakto ke la terura fenomeno, kun aldono de Cunami tute detruis lian oficejon, en Santiago. Li estas devigata rekonstrui ĝin 100%...!!! – Ĉiuj ni, per la pensejo helpu lin, almenaŭ per konsoloj kaj preĝoj, ke Dio kompatu nian samideanon. Li aktivas en EkoLink. Mi mem bedaŭras ke la tertremo ne nur rompis lian poŝon sed ankaŭ kvazaŭ bankrotis lin. Li plendas ke li devas forte ŝpari por postvivi.

SCIO por SANA k.LONGA VIVO.

Oni tenu sin ekvilibrita vivulo kaj, se eble sprita preta ĉiam alpreni novajn sciojn, por ne senti sin oldiĝanta, per adekvataj nutraĵoj, prefere vegana, t.e, sen sangomakulita manĝaĵo sur la mangxotablo.Kontrolu, ĉu vi nutras sin per vegetaraj pladoj. Jen celtrafaj indikoj:

Aveno, enhavas triptofeno, ĝi estigas eŭforion; Spinaco, kalion kontraŭ deprimiĝo;oranĝo enhavas la vaste uzatan vitaminon-C kaj kalcio; Kikero,* kun triptofano plus serotonino, ĉitiu helpas dilui la triptofanon, enhavas magnezion,(Mg), kiu mildigas la streson;ĉokolado ankaŭ enhavas triptofanon, teobrominon; Pipron, kun kapsaicino kiu favoras la lingvajn nervojn kaj aldonas endorfinon;Mielon, kalcion kaj aliajn mineralojn kiu altigas glicemion;bananon,vitaminon B6 kun piridoksino, triptofanon,magnezion plus biotinon; Maraj vivaĵoj, zinkon kiu altigas la atentemon, seleno kontraŭ deprecio, laceco, muskola doloro.

- Kikero= brazile, Gão-de-bico.

CW-QSO=Permorsa Komunikado

Jen aperitivo, por ne-radioamatoroj, por ke ili havu ideon kiel okazas ĉarmaj komunikadoj inter du aŭ pluraj bonaj radiotelegrafistoj. - Kun resopiro pri radiokolegoj mi promene tra la bendoj “strigumis”, en 09/03/10 laŭ CW-modo. Baldaŭ mi trovis viglan QSO inter gaŭĉo kaj bahiano. La babilado estis pri doloroj kaj medikamentoj tiurilataj. La babilado etendiĝis longe. Flanke oni perceptis ĉeestantajn kolegojn pro gajaj ridetoj .. .. .., hi hi hi aŭ, angle, haj haj haj, kiuj atendes brecon por povi sin anonci kaj enmiksiĝi en la bolantan kaldronon. Unu el la parolintaj kompanoj, aŭdinte tion, malfermis la “pordon” per la dirajo “ni vidu, kiu aĉulo frapis. La frapinta kolego envenis, formale salutis kaj reagis: «aĉulo estas via avinjo». Diris la ĝis nun silenta kolego: “Li estas la avo de Matuzalem”! Alia diris: ”Li estas cirka stelulo” La QSO gaje daŭris triope ĝis la pli frue alveninta adiaŭis per 73 al la restantaj amikoj. Mi nur silente strigumis pro tio ke nuntempe per mia aparato ne eblas CW-umi. Kvankam ili ne menciis nomojn, evidente ili kune spritumas de longaj jaroj.

Daŭrigo – DE Santarem’ al RIO(?)

La flugo daŭris normale, oftaj meteobultenoj kiel kutime envenis. Ĉie troveblas bela vetero krom pluvetoj dise tra la irvojo. Ni forgesu zorgojn pro la liva motoro...do.”bastononi la azenon”, kutimis ŝerce diri la skipanoj, por estigi fidon, ke la malnova aviadilo portos nin sekure ĝis RIO.- Ĝis Porto-de-Moz’ ĉio marŝis glate. Iom post kiam mi informis al la KontrolCentroBelem’ tiun fiksan nepre raportendan punkton de la flugo, kun la estimata alvenhoro en Belem’, la nuba plafono je 3000m malaltiĝis kaj fariĝis kontinua. Distance for videblis pluvaj kurtenoj. Rezulta rapido, kiel kutima en tiu regiono, restis malalta ĉ.240Km/hore. La komandanto laŭte kriis entuziasmige: “junuloj, preĝu por ke nia liva motoro kuraĝe eltenu kiam ni denove eniros pluvadon”, videblan ĉ.15 minutojn for ĝuste antaŭ ni. Bonŝance tiaj veterkondiĉoj ne prezentas enaerajn agitemojn, la flugo estis serena. Venkinte tiun distancon ni vere “merĝis” en fortan pluvadon. Post paron da minutoj la motoro ekvibris, des pli forte kiam oni testis la magnetojn. Longjara piloto, Heljo iom reduktis la benzinliveradon kaj observis. La motoro ne trankviliĝis same kiel la flugistoj, tamen eblis teni la flugnivelon, kompreneble nun per ankoraŭ iom malpli alta rapido. Ni fidu je Dio ke ni atingos Belem’. Dio tamen volis submeti nin al pli stresiga provo. Nun ankaŭ la dekstra motoro decidis solidariĝi kun sia kunulo...! En pluvo ĝi ankaŭ vibradis kaj tion oni laŭeble devas eviti dum longa tempo. Jam okazis ke al iu skipo dum flugo trae de SanktaKruz’ apud Rio, la difektita motoro tute defalis pro tia problemo. Ni nun limakumis ĉ.200Km for de Belem’.Nun,je 70Km for antaŭ ni situas la vilaĝo Kuralinjo, apud riverbrako. Konsultante manlibron oni konstatis ke tie iam viglis etaj turismaj aviadiloj nacilingve alnomataj TekoTeko. Baldaŭ videblis surlanda strio kiu iam estis la kurejo, delonge ne plu uzata. Ĝia aspekto neniel kuraĝigis surteriĝi tie des pli ĉar, videblis nigrebrunaj montoj kiuj ŝajne estis dikaj ŝtonoj dise tra la kampo. Dume la pluvo ĉesis kaj mi riskis sugesti:Komandanto, provu ĉu almenaŭ unu el la du motoroj eltenos plenan potencon, por ke per ĝi ni povos atingi grandan aerodromon, en la kazo Belem’.Ĝi, de Kuralinjo distas 130 Km. Kiam li provis la vibrado intensiĝis. Sen alternativo, oni faris la alproksimiĝan proceduron sen scii la surteran venton regantan sur en la momento. En fina fluglinio Heljo. diris nur kurtan ”ĉiu akomodiĝu plejeble sekure». Minuton poste la radoj tuŝis la teron. Surprizo, pli tenere ol ŝajnis okazi, tial ke la grundo estis kvazaŭ marĉa, Dankaldio

sufiĉe firma por elteni la 12 tunan kunpuŝiĝon. La radoj sulkis teron kvazaŭ defluilon. Taksiado ne eblis. Baldaŭ alkuris dekoj da scivoluloj, pro la rarega fakto ke tiel grandega aviadilo montriĝis inter ili.Ni kunportis nur ok pasaĝerojn. Post radiokontaktoj oni sciigis nin ke baldaŭ Katalina, amfibia aviadilo de Panair, alvenos forporti la pasaĝerojn. Ĉirkaŭ du horojn poste ni kaj ekvidis la alvenantan sukuraviadilon. Ĝi surakviĝis, oni adiaŭis la pasaĝ,erojn. Rilate nin skipanojn, la solvo estas iom pli longa.Per radiokontaktoj al Belem'ni estis informitaj, ke nia saviĝo okazos pere de alsendo de mekanika skipo, motorpartoj kaj benzino sendatajn per ŝipo. Tial oni devis zorgi pri restadejo. Tro multaj familianoj eĉ kverelis pro la deziro gastigi la aviadistojn en siaj hejmoj. Fine gajnis la preferon la familio Bordalo, ĉefe pro tio ke ĝi posedis riverdokon kun surrivera kabano ĉirkaŭ du metrojn super la plej alta tajdo.Ĝi tre plaĉis al la skipanoj, excepte ke ne estis litoj. Oni devis dormi en hamako. Iam la familiestro vizitis siajn gastojn, por sciigi, ke sub la

kabano ekzistas fiŝkaptejo, iu ronda palisaro kun enirejo por la fiŝoj, sed senelireja. Li disponigis al ni la eblecon kapti kaj konsumi ilin. Kvazaŭ festa danko el ĉiuj ni. Antaŭ forlasi nian loĝejon sinjoro Sandoval Bordalo laŭte demandis nin ĉiujn: Nu, kiel vi dormas ĉi tie? Nur la duono respondis, «bone!». Kaj li aldonis: tiun mi estis diveninta. Popoldiro ja asertas ke, pli facilas leprulo eniri la Ĉielon ol gaŭĉo dormi en hamako.

La prognozo por nia restado tie estis longa, eble du semajnoj. Oni tempopasige fiŝkaptis kaj sin banadis ĉiutage en la pura rivero ĝis iu memorigis, ke en Amazonio proliferas piranjoj tamen infanoj kutimis sin bani proksime de la riverbordo.

Belan matenon Bruno kaj mi decidis ekskursi, per la boateto «Korrejo do Piria'» riversupren rajdante sur la altiĝa tajdo. Jes, tie, 130Km for de la mara delto, la riverbranĉo suferas fortan suprenfluon, tiamaniere oni ne bezonas remi.Provizitaj per nutraĵoj kaj pafilo, por eventuala kazo sindefenda ni debordiĝis frumatene, ĝis la tajdo ĉesis peli nin. Tie ni trovis arbotrunkon falintan en la rivero, sur kiu ni restis iom da tempo dum kiu ni tagmanĝis. Samtempe oni esploris la ĉirkaŭaĵon kaj trovis grandajn brunajn skorpiojn. Nia vestaĵo estis ne adekvata por invadi veprejon do ni baldaŭ rezignis. Ne longe poste la reflua tajdo komenciGis kaj ni zorgis hejmen reveni. Laŭ la suna stato devis esti iom posttagmeze. La flosado estis lanta. Kiam ni ekvidis nian restadejon, tie staris pluraj homoj pretaj sukure postiri la du eskursantojn. Post oreltiro, pro la longa forrestado, ĉio normaliĝis. Vespermanĝo tiun tagon enhavis salikokojn miksitajn al nematuraj papajofruktoj. Por trinki neniam mankis la tie tre aprecata suko el Asai'. Ĝi estas ankaŭ manĝata miksita al manioka faruno.

La tagoj lante treniĝis. Antaŭ ol la sukuristoj alvenis ni okupiĝis laŭ oportunaj cirkonstancoj. Amikeco kun la enkuireja skipo donis bonajn fruktojn. Per etaj donacoj oni sukcesis ke la manĝaĵoj estis laŭ nia gusto kaj, cetere donis eĉ aminduman aferon. Ero pri tio legeblos en mia RAKONTARO far fraŭla flugisto, tial mi esperas ke ĉiuj gelegantoj scivole akiros ekzempleron el ĝi, kiam mi finpresigos ĝin.

Kiam nia metala pasero denove estis preskaŭ flugokapabla venis la zorgo havigi sekuran ekflugan spacon. Kelkaj altaj arboj estis forigitaj, benzinon nur plejeble malmultan oni enmetis. La tuta grupo da mekanikistoj estis postlasitaj reveni per ŝipo, por ne tro pezigi nian ekflugan pezon ĉar la kurejo mallonga postulis tion. Ni sukcesis ekflugi ene de minimuma sekureco sed preskaŭ

fortrançante arbopintojn. Laŭ postaj informoj, la tuta familio kun la hejma mastrino Dona Preta ordenanta, ĉiuj hejmanoj devis genuiĝi kaj preĝi por ke nia ekflugo okazu glate. Dankalŝi kaj Dio tiel okazis. Heljo unu fojon rondflugigis la PP-CCO(?) kies nomo estas Buĝio, dum oni vidis multajn spektantojn adiaŭi nin. Alvenintaj en Belem' oni ree civilizis sin, tiu estas, sin komforte banis, sin razis, demetis la porarbaran vestaĵon kaj surmetis la kutiman uniformon el blanka ĉemizo kaj blua pantalono, aldone ni fotiĝis. Ĝi restas ĉe mi kaj espereble estos aperigota en mia Rakontaro.
La cetero de nia rondvojaĝo okazis sen incidenco menciinda.

Skandala RESPUBLIKO

Tiel en Brazilo oni nomas loĝejon de pluraj studentoj.Aliaj opaj loĝejoj heredas la saman nomon.
Tri flugistoj, ĉiuj radiotelegrafistoj, Anes, Ĵorĵe kaj mi kun la flugista nomo Vaske, delonge loĝis en la centro de Rio tamen sen oportuna buslinio por atingi la flughavenon SantosDumont' serĉis alian adreson. Pere de amiko atingis nin informo, ke apud la Flughaveno troveblas bona ĉambro disponebla. Ni tri kune, dum libertempa tago, vizitis la ejon. ĝi estis granda apartamento regata de sinjorino Marina, gaŭcino el SantaMaria-RS. La loĝejo plaĉis al ni, kontrakton ni faris kaj baldaŭ transloĝiĝis al nia nova adreso ĉe la strato MareŝalKa'mara, sur la oka etaĝo, ducent metrojn for de nia laborejo. Malkonvenon ni devis elteni pro la proksimeco de la flughaveno. Ni tri, fraŭloj, devis tro ofte ŝtopi breĉon, por ne prokrastigi ekflugon, en la unusemajna flugojprogramo, kiam kolego malsaniĝis aŭ suferis akcidenton, do unu el ni estis urĝe mobilizata por tuj tuje ekflugi plenumante ne atendatan programon. Rezultis ke ofte ni devis rezigni pri iam zorge planita festo aŭ vizito. Iam Ĵorĵe, kunvokita flugi en aerofoto-aviadilo, dum kelkaj monatoj. De tiam loĝis ĉe ni la telefona teknikisto, dungato de Panair, Manoel', portugalo plenkreskinta en Francio. Ne bezone elstarigi lian kartavan akcenton, bona kompano, iomete sprita. Nia triopa dormoĉambro situis meze de la apartamento. La nia najbaris duonvande al geo. Li estis nordorientano kaj loĝis kun sia Marina. Flanke situis ĉambro okupata de geo, li portugala komercisto, ŝi el la stato Parahiba. En la alia ekstremo loĝis la mastrino Marina kun sia policisto. Ŝi nomis lin "PiskaPiska", ankaŭ gaŭĉo.Ni kunvivis kiel harmonia familio. Iam tiam oni festis ies datrevenon kaj la mastrino Marina konsentis akcepti vizitantinojn, prefere el ŝia aro da amikinoj. Ili ja estis lertaj kaj prenis sur sin etajn taskojn, kiel ripari vestaĵon, alkudri butonojn, lastminute gladi ĉemizon, kaj priatenti karencojn de la knabegoj. Iam okazis ke rigora inspektoro, la famekonata Padilja, vizitis la loĝejon, verŝajne pro suspekto ke tie okazas prostituado. Li kontroligis la identigan karton de ĉiu krom tiujn de la flugistoj ĉar sur la ŝranko li ekvidis kepojn en nia ĉambro. Se misfaroj okazis, neniu rimarkis. Kie neniu akuzas iun pro eta incidento, tie ĉio baldaŭ revenas al bonordo.
.....Eble ankaŭ vi ridetos aŭ ridaĉos:
Bieruma kunsido de viroj certe diskutas pri futbalo, babilas pri aŭtoj kaj, ne laste, pri virinoj. Dum ina tekunsido, same kiel tiuj de viroj, ili babilas pri modo, fasonoj kaj certe ankaŭ pri viroj, por seksa evaluo. Oportunas la demando: Ĉu vi scias kial la rigardo de inoj celas la pugon de viroj?
R-- Ĉar tie situas la monujo.

Sur scenejo humuristo lerte rolas ebriulon kaj drole rakontadas al vasta aŭskultantaro serion da malfeliĉoj okazintaj al li, unu pli ridiga ol la antaŭaj. Subite li serioza demandas al sia publiko: Ĉu vi scias kio estas la plej malfeliĉiga okazintaĵo kiun mi suferis ?...far ?.....R – Mi deklaras vin edzo kaj edzino.
.....Miaj karaj gejunuloj, estu singardaj, se vi pensas per edziĝo senpage satiĝi de seksumado, vi « deprenu vian ĉevaleton el la pluvo « kutimas rekomendi gaŭĉeska popoldiro.